# CARLAND Cross

M. OLEFFE O. GRENSON

## 4 MISTERO EN LAGO NESS

### 1-a parto. *La malbenita ekspedicio*



ESPERAĴO


**Originala titolo:** *Carland Cross 4: La Mystère du Loch Ness I. L'expèdition maudite*
**Aŭtoroj:** Michel Oleffe, Olivier Grenson
**Jaro de originala publikigo:** 1994

Cifereca eldono de Studio Esperaĵo, aŭgusto 2025
**Esperanta traduko kaj kompostado:** Mikaelo Kastro



# MISTERO EN LAGO NESS

## 1-A PARTO. LA MALBENITA EKSPEDICIO







*La originalo asertas tion ĉi, tamen tiu fakto ne estas vera. Lago Ness ne estas la plej vasta lago el la Britaj Insuloj. Ĝi ne eĉ estas la plej vasta lago el Skotlando mem.


LA VENĜO DE...
JEN REYNES, DENOVE LI DELIRAS! KIU ESTAS PLI FRENEZA, ĈU REYNES AŬ RAGNAR?
LA VENĜO DE LA VIKINGOJ!
NEEEE
RAGNAR LA FRENEZA! NEEEEE! NEEEEE!!
AAAAAAAAAAAAA



TRI TAGOJN POSTE. LONDONO, STACI-DOMO KING'S CROSS
LA MALBENITA EKSPEDICIO DE LAGO NESS DAŬRE ESTAS NOVAĴO!
WAY OUT
11
PLIAJ MALAPEROJ EN LA EKSPEDICIO ALBANY-PORTLETT! AĈETU «LONDON DESPATCH»!
TICKETS
LONDON DESPATCH
L'EXPEDITION MAUDITE
ŜAJNE ONI PAROLAS NUR PRI LA MALAPEROJ, MAJSTRO! INDAS DIRI, KE JAM MALAPERIS SES HOMOJ!
LA POLICO EKESPLO-ROS BALDAŬ. LA ĈEFA MALAPERINTO ESTAS LORDO PORTLETT, KIU ESTAS LIGATA AL LA REĜFAMILIO, ĈU?
TO TRAINS
GESINJOROJ, SENDUBE LA MALBENO TRAFINTA LA MEMBROJN DE LA EKSPEDICIO ALBANY-PORTLETT ESTAS DIA FARO. LA ETERNULO DIRIS...
PASSENGERS CROSS THE LINE BY THE BRIDGE
JEN LA TRAJNO DE SINJORINO STONE. ESPEREBLE ŜIA RESTADO EN LA MEZLANDOJ REVIGLIGIS ŜIN.
KIA HOMAMASO! MI NE VIDAS ŜIN!
VI, SEN-HONTULO, KANAJLO, KRUDULO!
10



SOVAĜULAĈO! IMPERTINENTA!
JEN LA VOĈO DE SINJORINO STONE! DIO MIA, SED KIO OKAZAS TIE?
10
BONAN POSTTAGMEZON, SINJORINO STONE. MI VIDAS, KE VI ESTAS TRE NERVOZA!
HO, SINJORO CROSS! ESTAS... TERURE!
DANK' AL ĈIELO, TIU ĈI PERFEKTA ĜENTLEMANO ESTIS EN MIA KUPEO. LIA ĈEESTO ESTIS KVAZAŬ BENO!
POULTRY, HORACE POULTRY!
KIEL VI FARTAS?
TIU ĈI HONORINDA SINJORO POULTRY PROTEKTIS VIN KONTRAŬ KIO, SINJORINO STONE?
KONTRAŬ TIU INDIVIDUO! VERA FRENEZULO, KIU SENĈESE KRIEGIS SENSENCAJN VORTOJN. ĈIUJ LIAJ AGOJ ESTAS HONTO POR LA BRITAJ FERVOJOJ!
WAY OUT
LI SURIRIS SUR LA TRAJNON DUM HALTO FARITA PRO TEĤNIKAJ KIALOJ. ŜAJNAS AL MI, KE LI VENIS EL SKOTLANDO. EVIDENTE LI ESTAS MENSMALSANULO!
AAAAAAAA


VE, LI KOMENCAS KRII DENOVE...
KURAĜE, MIA KARA DAMO!
FINE LI VUNDOS IUN!
RAGNAR LA FRENEZA!
EK, POLICANO! NECESAS HALTIGI TIUN MALFELIĈULON, LI SALTIS SUR LA RELOJN!
GRIiiiiiiiiiiii
TSHH
NE!
PÔÔÔÔÔ



HAAAAA...!
EK, VENIGU AMBULANCON TUJ!
PCHiiiiiiiii
LA EKSPEDICIO DE LAGO NESS... HAAA... AĤ...
ĈU VI PAROLAS PRI LA EKSPEDICIO ALBANY-PORTLETT?
VIKINGOJ! ATENTU LA VIKINGOJN! RIGARDU!
TRANKVILIĜU, AMIKO. LA KURACISTO VENOS TUJ...
VI ESTAS CARLAND CROSS, ĈU NE?
LA MALBENO DE RAGNAR... LA MALBE...
MAJSTRO, ALVENIS LA AMBULANCO!
ESTAS TRO MALFRUE, MIA KNAB'.
6.


BLACK&WHITE
TRAMS
KOMPATINDULO... MI SCIVOLAS PRI TIO, KIO POVIS FRENEZIGI LIN TIOM MULTE.
SINJORINO STONE, NI REIRU HEJMEN. ĈU NI VETURIGU VIN AL IU LOKO, SINJORO POULTRY?
JES, DANKON. MI LOĜAS PROKSIME DE STRATO HARLEY.
SED KIAL TIU ULO VENIS AL LONDONO POR MORTI? LIA ĜUSTA LOKO ESTIS LA PRIFOSEJO APUD LAGO NESS; LA LABOREJO DE LA EKSPEDICIO...
IO REVENIS NUN EN MIAN MENSON... RIGARDINTE LA TRAJNOBILETON DE LA MORTINTO, LA KONTROLISTO PAROLIS PRI INVERNESS. TIU KOMPATINDULO ŜAJNIS FUĜANTA DE DANĜERO. LI DAŬRE ŜANĜIS SIAN SIDEJON.
ĈIUOKAZE, KIA TURMENTO POR ĈIUJ ALIAJ RESPEKTINDAJ PASAĜEROJ, KAJ KIA TORTURO POR LA DECAJ VIRINOJ!
ADIAŬ, SINJORINO STONE. DANKON, SINJOROJ!
KION VI SCIAS PRI LA EKSPEDICIO ALBANY-PORTLETT, MAJSTRO?
NE MULTE. LA BRITA MUZEO KOMISIIS AL GRUPO DA FAKULOJ LA PRIFOSADON DE VIKINGAJ POSTRESTAĴOJ ĈE LAGO NESS. ONI ATENDAS TROVI GRAVAJN ARKEOLOGIAĴOJN. ŜAJNE LA PLEJ GRAVA ESTAS LA TOMBO DE IU VIKINGA ESTRO...
REBONVENON, SINJORINO STONE!
MI PREPAROS LA VESPEMANĜON, SINJORO CROSS. PHILPOTTS DEVIS ALPORTI JAM LA BOVIDAN KRURON...
EVIDENTE! TIU DRINKEMA VIANDISTAĈO NE LIVERIS LA VARON ANKORAŬ! EN KIA LANDO ONI VIVAS, DIO MIA! FRENEZULO EN MIA KUPEO KAJ NENIO EN MIAJ KASEROLOJ!
7





*Li aludas la preĝon «A furare normannorum libera nos domine». Zamenhof iam tradukis ĝin jene: «Liberigu nin Dio de l' sovaĝaj Normandoj».


HA, VI! KAJ EBRIA, KIEL KUTIME. MIZERA PHILPOTTS, VI ESTAS LA HONTO DE ĈIUJ BRITAJ VIANDISTOJ!
SED, SINJORINO STONE... VI SCIAS, KIAJ ESTAS MIAJ KLIENTOJ. HIK! NE ESTAS ĜENTILE RIFUZI PLENGLASON.
BONAN VESPERON, SINJORO CROSS. BONAN VESPERON, ANDY. DIRU AL ŜI, KE NE ESTAS FACILE FARI NEGOCOJN. ONI DEVAS PAROLI VIZAĜ-AL-VIZAĜE, KAJ UNU GLASO VOKAS ALIAN, KAJ... HIKS!
VI ESTAS BONŜANCA, KE VIAJ ŜAFIDAJ KRUROJ ESTAS LA PLEJ BONAJ EL LONDONO! SE NE, MI NE PLU VOKUS VIN.
KOMPATINDA PHILPOTTS. MI PENSAS, KE SINJORINO STONE ESTAS ĴALUZA ĈAR LI PASIGAS MULTE DA TEMPO ĈE SINJORINO PARTRIDGE, KIES MALNOVA ŜEREO ESTAS ONIDIRE MIRINDA...
SE PAROLI PRI ŜEREO... NI TRINKU EL NIA PROPRA BOTELO, ANDY.
MIN MALTRANKVILIGAS LA RILATO INTER LA AKCIDENTO ĈE LA STACIDOMO KAJ LA EKSPEDICIO. MORGAŬ MI IROS AL LA BRITA MUZEO... MI BONE KONAS LA HELPISTON DE LA KURATORO.
HISTORY OF THE VIKING INVASIO
LA SEKVAN TAGON, EN LA BRITA MUZEO.
PEABODY
CONSERVATOR
TOC
TOC



JE JOVO, CARLAND CROSS! AL MI PLAĈEGAS REVIDI VIN! ENPAŜU, DO!
FAKTE, MI ATENDIS VIAN VIZITON. MI VETAS, KE LA MORTO DE REYNES, HIERAŬ EN STACIDOMO KINGS CROSS, TIRIS VIAN ATENTON PRI LA AFERO ALBANY-PORTLETT.
VI ESTUS ELSTARA DETEKTIVO, INIGO. PRO TIO, KE LA CELO DE MIA VIZITO NE ESTAS SEKRETO POR VI, DIRU AL MI ĈION, KION VI SCIAS.
LA EKSPEDICIO SERĈAS LA TOMBON DE VIKINGA REĜO: RAGNAR INGMARSSON, KROMNOMITA RAGNAR LA FRENEZA. ŜAJNE, LI SETLIS ĈE LAGO NESS ĈIRKAŬ JARO 890. ONI SCIAS TION DANKE AL RUNAJ ENSKRIBOJ, KIUJN ONI MALKOVRIS DU JAROJN ANTAŬE, PROKSIME DE CULLODEN.
VERŜAJNE RAGNAR ENTOMBIGIS SIN, KUNE KUN GRANDA PARTO DE SIA KORTEGO, KIU ESTIS TRAFITA DE EPIDEMIO. LA PRIFOSADO PROGRESIS TRE BONE, ĜIS LA ARKEOLOGOJ KOMENCIS RICEVI HALUCINOJN.
HALUCINOJN?
TEMAS PRI BILDOJ DE VIKINGOJ, TRE TERURAJ, LAŬ TIO KION MI AŬDIS.
KAJ NESSIE...
NESSIE?
JES, LA FAMA MONSTRO DE LAGO NESS. NE NECESAS DIRI, KE NENIU EL LA BRITA MUZEO PRENIS TIUN AFERON SERIOZE... ĜIS LA MALAPEROJ KOMENCIĜIS. REYNES ESTAS LA UNUA EL LA SES MALAPERINTOJ, KIU ESTIS TROVITA... SED MORTINTA.
KAJ KION FARIS LA POLICO?
LA MALAPERO DE LORDO PORTLETT INSTIGIS LA POLICON SENDI UNU EL LA PLEJ BONAJ DETEKTIVOJ. SED LA ESPLORO POVOS POSTULI TEMPON. DUME, LA PRIFOSADO PROGRESAS MALRAPIDE. NE PLU ESTAS VERA VOLO INTER LA LABORISTOJ.
LA ELTROVO DE LA TOMBO DE RAGNAR LA FRENEZA ESTUS EKSTERORDINARA ARKEOLOGIA MALKOVRO. LA TUTA KORTEGO DE VIKINGA REĜO, CARLAND!
TRE TENTA AFERO, JES JA.
KIO ESTAS TENTA, MALNOVA AMIKO?
TIU LAGO MEM! LAGO NESS DEVAS ESTI BELEGA ĈI-SEZONE.
10

DU TAGOJN POSTE...





RIGARDU! JEN LAGO NESS!
VI ELEKTIS BELEGAN DOMON, SINJORINO TROTTLE.
DUM VI KOMFORTIGAS VIN, JOSEPHINE KAJ MI PREPAROS LA VESPERMANĜON.
MI PRETIGIS ĈION EN LA KUIREJO POR FARI FIŜ-KAPOJN FARĈITAJN PER GRASO KAJ AVENKAĈO!
FIŜ... KIO?! PU!!
LA DOMO ESTAS EN TRE FAVORA SITUO, ANDY. LA PRIFOSEJO DE LA EKSPEDICIO ALBANY-PORTLETT ESTAS KELKAJN MEJLOJN FOR DE ĈI TIE. ONI POVOS STARIGI BONAN KAŜRIGARDADON.
LOCH NESS
TOC
TOC
TOC
VI...!



NU, JUNULO. ĈU VI NE REKONAS MIN? ĈU MI ALMENAŬ RAJTAS ENIRI?
!
CERTE JES, SINJORO WINGFIELD. MI BEDAŬRAS... SED VI JA SURPRIZIS MIN.
?
ĈIELO, WINGFIELD! DO VI ESTAS TIU ELSTARA DETEKTIVO, KIUN LA METROPOLA POLICO SENDIS ĈI TIEN. ONI NE POVIS ELEKTI PLI BONAN! NIAFLANKE, NI FERIAS.
NU, NU, NU...
KIO MISAS, MIA KNAB'?
NENIO, MAJSTRO. MI... VE, NEKREDEBLE! ŜAJNIS AL MI, KE MI VIDIS... VIKINGON!
LA SAMA TEMO DENOVE! TUTE FRENEZE, KIOM DA VIKINGOJ ONI VIDAS EN ĈI TIU AREO. KAJ ILI CERTE NE VENIS LUDI KARTOJN EN NOKTA GASTEJO, NE... VI ALVENIS ĜUSTATEMPE, CARLAND, KREDU MIN. NI DU SOLAJ NE POVOS EKKOMPRENI TUTE BONE TION, KIO OKAZAS ĈI TIE...
NU, MARMADUKE... VI FLARIS MIAJN MANĜAĴOJN EĈ EN SKOTLANDO! MI SUPOZAS, KE VI VOLAS REGALI VIN PER NIAJ FARĈITAJ FIŜKAPOJ?
FARĈITAJ FIŜKAPOJ, ĈU? FRANDAĴO!!
13


MILDRED, JOSEPHINE, MI VOLAS GRATULI VIN. MI RETROVIS EN VIAJ PLADOJ LA SKOTLANDON DE MIA INFANAĜO, KIAM MIA MALRIĈA PATRINO PREPARIS TIUJN DELIKATAĴOJN... LEPORAĴAN SUPON, MIKSOPOTON, TETRAONAĴON KUN SAŬCO...
KAJ HAKETITAN BOVAĴON... KIOM DA BONGUSTAJ MEMOROJ!
DIRU AL MI, WINGFIELD, PRO TIO KE LA CIRKONSTANCOJ KUNIGIS NIN. KIUJN RIMARKINDAĴOJN VI TROVIS ĜIS NUN?
STRANGAJN AFEROJN. KAJ LA LABORISTOJ ĈE LA PRIFOSEJO KAJ KELKAJ VILAĜANOJ DIRAS, KE IUJ ORELAJ ZUMOJ ĜENAS ILIN. ILI ANKAŬ PAROLAS PRI NEKLARIGEBLAJ VIZIOJ. ĈIUJ MIAJ HELPISTOJ SPERTIS TION... FOSCOTT, KIU ESTIS SOBRA, ASERTIS VIDI LA MONSTRON DE LAGO NESS. ALIAJ ASERTAS, KE HORDOJ DA VIKINGOJ ATAKIS ILIN. ĈU VI KONSCIAS LA GRAVECON DE L' SITUACIO?
ĈU EBLAS, KE IU BLAGAĈAS AL VI ĈIUJ? SKOTOJ, ĈEFE ĈI-REGIONAJ SKOTOJ, MALŜATAS ANGLOJN. EBLE ONI DECIDIS FORTIMIGI VIN.
NE PAROLU AL MI PRI SKOTOJ! MIA PATRINO ESTIS SKOTA. SED ILIA ĈIAMA ATAKEMO AL LA «LONDONAJ HOMOJ» ESTAS MALTRANKVILIGA. MIAJ VIROJ NE VOLAS EĈ IRI EN LA TAVERNON; ILI TIMAS INTERBATIĜON.
KAJ LA MALAPEROJ?
NE EBLAS KLARIGI ILIN. PANIKO SUPERREGAS LA ULOJN, KAJ ILI FORKURAS. ALIAJ IRAS ESPLORI LA LAGBORDON. NENIUOKAZE ILI ESTAS RETROVATAJ. REYNES ESTAS LA SOLA ESCEPTO. MI NE SCIAS KION FARI!
ĈU VI MANĜOS DESERTON, MARMADUKE? JEN FROMAĜKREMO KUN BEROJ.
VOLONTE!
KION VI PRIPENSAS, MAJSTRO?
ESTAS STRANGE, ANDY, SED... MI SENTAS TIMON!
14



LA SEKVAN TAGON...
JEN LAGO NESS, KAJ LA PRIFOSEJO.
BONAN TAGON, SINJOROJ. MI ESTAS ADALARD HALFORD, MI ANSTATAŬAS LORDON PORTLETT. SUPER-INTENDANTO WINGFIELD INFORMIS MIN PRI TIO, KE VI VENUS ĈI TIEN.
KIEL VI FARTAS?
JEN LA FUNDAMENTOJ DE GRANDA DOMO, KIE VIKINGOJ PASIGIS VINTRON. LA KONSTRUAĴO ESTIS SIMPLA, KUN PAJLA TEGMENTO, CERTE, SED ĜI ESTIS SUFIĈE VARMA KAJ KOMFORTA. ILI VIVIS KUNE, KOMUNUME...
MI KREDIS, KE VI SERĈIS FUNEBRAJN ŜIPOJN...
JES JA, SED TIU TROVO ESTUS HAZARDAĴO. LA LABORO DE ARKEOLOGO ESTAS BAZITA SUR PACIENCO. NI JAM ESTAS FELIĈAJ, KE NI TROVIS TIOM DA ĈIUTAGAJ KAJ ORNAMAJ OBJEKTOJ.
ĈU LA DOMO DE RAGNAR LA FRENEZA?
SENDUBE JES, LAŬ TIUJ RUNAJ ENSKRIBAĴOJ. TAMEN, LA MODESTA GRANDO DE LA KONSTRUAĴOJ PERMESAS AL NI SUPOZI, KE ESTAS ALI...
MALBENO VIN TRAFU, MIZERA PROFANANTO!


LA MARKO DE RAGNAR FALIS SUR VIN!
BALDAŬ LIA ARMEO BUĈOS ĈIUJN VIAJN! RAGNAR NE SCIAS PRI KOMPATO. VI ĈIUJ ESTAS MALBENITAJ, MALBENITAJ, MALBENITAJ!
KIU ESTAS LI?
SPOTTY, FRENEZA MALJUNULO, TUTE SURDA, KIU LOĜAS APUD LA VILAĜO. LI KONTRAŬAS ĈION, KIO PERTURBAS LA RIPOZON DE RAGNAR, KAJ LI ASERTAS, KE ĈIUJ NIAJ PROBLEMOJ ESTIĜIS PRO LA VENĜO DE L' VIKINGOJ.
NI POSTIRU LIN, ANDY!
KIO?!
LI DIREKTIĜAS AL LA VILAĜO.


VE, KIEN IRIS TIU SPOTTY?
NI IRU EN LA TAVERNON.
BONAN MATENON!
IOM DA VISKIO, BONVOLU.
ĜI ELĈERPIĜIS!
ONI NE DONAS ION AJN AL FREMDULOJ, ĈU VI KOMPRENAS?
LASU ILIN, LACHLAN!
MI TRANĈOS LA GORĜON AL VI KVAZAŬ VI ESTUS KOKO, ANGLAĈO.
KLINK


DANKON PRO LA BONVENIGO, SINJOROJ. TAVERNESTRO, ENSKRIBU LA BOTELON EN MIAN KONTON.
MAJSTRO, MI NE KOMRENAS ILIAN SINTENON...
HIERAŬ NOKTE, WINGFIELD KONFIDIS AL MI, KE ĈI TIUJ SIGNOJ DE MALAFABLECO MALTRANKVILIGAS LORDON BASINGSTOKE. KAJ TIU LASTA RIGARDAS ĈION ĈI KIEL TOKSADON.
FINE NI PERDIS LA SPURON DE SPOTTY. NI SERĈU LIN EN LA BORDO DE LA LAGO, LI NUR POVIS IRI TIEN.
HE, TIE ESTAS SPECO DE KASTELO!
... KAJ ANKAŬ FIŜHAVENO!
AŬ ŜIPKONSTRUEJO DE PLEZUR-VELŜIPOJ. MI NE ATENDIS VIDI ION TIAN...TIE ĈI!


ANDY, IRU LAŬ LA DEKSTRA FLANKO. SE VI NE TROVUS SPOTTY-ON, REIRU AL LA DOMO. MI PROKSIMIĜOS AL LA ŜIPKONSTRUEJO.
CN253
VERŜAINE ĈI TIU LOKO ESTAS TRE GARDITA. IOM TRO GARDITA...
TÛÛT
?!
MI KONSTATAS, KE VI INTERESIĜAS PRI PLEZURŜIPOJ. MI ESTAS LA POSEDANTO DE ĈI TIU ŜIPKONSTRUEJO, MI NOMIĜAS MEDWENNA McGUIRE. MIAJ AMIKOJ RAJTAS NOMI MIN «MED». KIEL VI NOMIĜAS?
CROSS, CARLAND CROSS!
ĈU LA FAMA DETEKTIVO?! ĈU VI BONVOLUS TEUMI KUN MI? TIO ESTUS GRANDA HONORO. MI POVUS MONTRI AL VI MIAN MODESTAN ŜIPKONSTRUEJON.
KUN PLEZURO.
ONI PROVAS DISVOLVI MALMULTEKOSTAN VELŜIPON POR ALLOGI DILETANTOJN AL TIU ĈI EKSTERORDINARA AKVOMASO NOMATA LAGO NESS.
ĈU VI FARIS PROGRESOJN?
LA TASKO ESTAS MALFACILA, SED LA KVALITO DE NIAJ ŜIPOJ PLIBONIĜAS SENHALTE. NIA ALTMASTA VELŜIPO «SAILING SCOTSMAN», JAM GAJNIS PLURAJN PREMIOJN.
H 2
H 3
LI ESTAS ENKAPTITA EN RATOTRUO, MIA KARA WADE. NUN VI IZOLU LIAN MENSAN FREKVENCON.
MI NE BEZONOS MULTE DA TEMPO...
19




VI RIMARKOS, KE MIN ENTUZIASMIGAS LOKA HISTORIO, KAJ KE MIN RAVAS NESSIE, LA MONSTRO DE LAGO NESS.
VI DO KREDAS JE ĜI.
KIEL MI POVUS NE KREDI JE LA MONSTRO, KIAM MI HAVAS ANTAŬ MIA VIDO ĈI TIAN DOKUMENTON? TEMAS PRI FOTOGRAFAĴO FARITA DE DOKTORO WINSTON ANTAŬ KELKAJ JAROJ. SE NE PAROLI PRI LA DEKDUOJ DA ATESTOJ ENREGISTRITAJ NUR DUM LA JARO 1933...
ONI ATRIBUAS TIUJN INCIDENTOJN AL LA NOVA VOJO POR AŬTOJ, KIUN ONI FARIS APUD LA LAGO. TIU VOJO PERMESAS RIGARDI LA LAGON DE MULTAJ ALIAJ FLANKOJ, KAJ LA IMAGO DE VILAĜANOJ ŜVELIĜIS.
ANKAŬ EBLAS ASERTI, KE LA DINAMITO UZITA DUM LA VOJKONSTRUADO PERTURBIS LA MONSTRON, KIU ŜAJNE SERĈIS KAŜEJON EN LA SUBAKVAJ KAVERNOJ DE L' ORIENTA BORDO DE LA LAGO.
TIU CARLAND CROSS ESTAS MALFACILA VIRO, KARA MURDOCK. LI ESTAS TRO SINGARDA, KAJ MI NE POVAS KAPTI PLIAJN INFORMOJN. LI ESTAS MALFIDEMA.
H 2
H 3
REPROVU. KAJ DUME, SENDU KELKAJN «VIZITANTOJN» AL TIU KURAĜA ANDY WHITE. CERTE LI NE ELTENOS LONGE!


KIO OKAZAS? DENOVE SONAS TIUJ BRUOJ!
MI PENSAS, KE IU FRAPIS JE LA PORDO, MILDRED. KIU HAVUS LA BONEGAN IDEON ĜENI TIUJN, KIUJ PREPARAS PUDINGON?
NE MOVU VIN, JOSEPHINE. MI MALFERMOS LA PORDON.
SANKTA DIO!
ICHABOD, HELPON!
SINJORINO TROTTLE?
KKKKKKRAOO
21




ICHABOD, VI NENIAM TUŜU ALIAN GLASON DA DRINKAĴO DENOVE!
WHAM
THAK
AAAAAAH
VE, KIO OKAZAS EN LA DOMO?
DIO MIA!
NEEEE!
22




*Ĉina teo farita el fumaĵitaj folioj.



DIO MIA, SINJORINO STONE!
ĈIELO, SINJORO... KIEN IRIS ĈIUJ TIUJ SOVAĜULOJ?
KIUJ SOVAĜULOJ?
VIKINGOJ! GRANDEGAJ BARBAROJ NIN ATAKIS.
TIA ESTAS LA VENĜO DE RAGNAR LA FRENEZA!
VI ĈIUJ ESTAS MALBENITAJ, MALBENITAJ!
NUR FERMU LA BUŜON, MALBONAŬGURA BIRDO!
STRANGE! MI NE VIDAS SPUROJN DE PAŜOJ.
ĈU VI CERTAS, KE VI NE SUFERIS MALBONAN SONĜON?
EĈ NE DUM MIAJ PLEJ MALBONAJ EBRIOJ (KAJ MI JAM HAVIS KELKAJN) MI VIDIS ION SIMILAN AL TIUJ VIKINGOJ, SINJORO!
PARENTEZE, ILIA ESTRO ESTIS TRE BELA VIREGO.
KIO OKAZIS ĈI TIE?
24


WINGFIELD?
NU, WINGFIELD, ĈU LA ATAKINTOJ LASIS IUN POSTSIGNOJN?
VERŜAJNE ĈIUJ EN ĈI TIU APUD-LAGA AREO SUFERIS VIZIOJN... NU!
ĈIO ĈI IRITAS MIAJN VIROJN. EKESTIS MULTAJ RAPORTOJ PRI VIKINGOJ EN LA REGIONO. ŜAJNE ANKAŬ VI ESTIS VIZITITAJ DE ILI.
NENIUN. VERŜAJNE ĈIUJ EN ĈI TIU APUD-LAGA AREO SUFERIS VIZIOJN.
PARENTEZE, AMIKO. KIE VI ESTIS DUM LA ATAKO OKAZIS?
MIAJ VIROJ KAJ MI FARIS ESPLORADON EN LA LAGBORDO, APUD LA ŜIPKONSTRUEJO...
KION VI HAVAS EN LA KAPO, MAJSTRO?
WINGFIELD... NEK VIAJ AGENTOJ NEK MI VIDIS ION SUSPEKTINDAN ĈAR, KIAM LA ATAKOJ OKAZIS, NI ĈIUJ TROVIĜIS APUD LA ŜIPKONSTRUEJO. TRE INTERESA FAKTO, ĈU NE?
ĈU VI PENSAS, KE LA VIKINGOJ KAŜIĜAS EN TIU LOKO?
MI PENSAS, KE TUTE NE EKZISTAS IU AJN VIKINGO!
KIO ?!
25.


LA SEKVAN TAGON...
ANDY, DUM LA SINJORINOJ KAJ ICHABOD PURIGAS LA DOMON, NI DISIĜOS POR EKHAVI LA MAKSIMUMAN KVANTON DA INFORMOJ PRI LA VIKINGAJ APEROJ, KAJ NI REGISTROS ILIN EN ĈI TIU MAPO.
LOCH NESS
KIO ESTAS LA FINA CELO?
MI PENSAS, KE ĈIUJ FENOMENOJ: NACIISMAJ ATAKOJ, FANTOMAJ APEROJ, LA MONSTRO DE LAGO NESS KTP... ILI ĈIUJ MANIFESTIĜAS ENE DE FIKSA PERIMETRO, KAJ MI VOLAS TROVI LA CENTRON.
DUM LA TUTA TAGO...
CLOSED
LA DU DETEKTIVOJ PRIDEMANDAS SENRIPOZE LA...
VILAĜANOJN.
MIA HIPOTEZO ESTIS TRAFA. ĈIO KONVERĜAS AL LA ŜIPKONSTRUEJO DE TIU BELA MEDWENNA McGUIRE. KIAN LUDON ŜI LUDAS?
ĈIELO! KIO ESTAS ĈI TIU ORELZUMO?
26



KOMENCIĜIS LA LUK-TO, CARLAND CROSS!
NEELTENEBLA BRUO! MI TRANSIROS LA MONTETOJN. MI VOLEGAS ALVENI AL LA DOMO!
GRATULON, WADE. VI BEZO-NIS IOM DA TEMPO, SED ĈI-FOJE VI SUK-CESIS FINFINE.
!!!



DIABLE! LA LAGBORDO! NE EBLAS ESKAPI!
PAW PAW
?



TTTTT
TRSHH
KONKLUDA EKSPERI-MENTO, MIA KARA MURDOCK!
REGADO DE MENSA FREKVENCO CERTE ESTAS LA PLEJ EFIKA TEKNIKO. UNU PLIAN PROVETON, KAJ ONI LASOS LIN TRANKVILA DUM ĈI TIU NOKTO!
DIO MIA!
BLAM
?
MAJSTRO! MAJSTRO! KIE VI ESTAS?
ĈI TIE, ANDY. MI BONFARTAS NUN. EK, LUMIGU LA LAGBORDON!
ĈIELO! NENIU SPURO!
29.


LA SEKVAN TAGON, DUM LA MATENMANĜO...
TRE SERIOZAJ AFEROJ OKAZAS ĈI TIE, ANDY. MI PROPONIS AL WINGFIELD, KE ONI INFORMU LORDON BASINGSTOKE POR VENIGI PLI DA AGENTOJ.
SED MI NENION KOMPRENAS PRI ĈI TIU VIKINGA RAKONTO. KIO ESTAS LA CELO DE ĈIO ĈI?
TION MI ANKORAŬ NE SCIAS, JUNA VIRO, SED MI CERTAS, KE PREPARIĜAS TERURA KOMPLOTO!
HA, ANDY! DUM MI REIRAS AL LA ŜIPKONSTRUEJO, PROVU TROVI AŬTON, KAJ LUPRENU POR NI BOATON EN FOYERS AŬ INVERFARIGAIG, EN LA ALIA BORDO DE LA LAGO.
EN LA ALIA BORDO, ĈU?
LA MAJSTRO ASPEKTAS MALTRANKVILA.
JES, LI EĈ NE TUŜIS LA OSTROJN KUN ŜINKO, KIUJN FARIS JOSEPHINE!
NU, NU! JEN CROSS DENOVE. ĈU TIU DIABLA VIRO HAVAS SUSPEKTOJN, AŬ ĈU LI SIMPLE CEDIS AL LA ĈARMOJ DE MED?
SALUTON, CARLAND. MI CERTIS, KE VI REVENUS. VI ŜATEGAS ŜIPOJN, ĈU MI PRAVAS?
MI JA ŜATAS ILIN.
30


ĈI TIE ONI STUDAS LA PROFILOJN DE LA ŜELOJ, CELANTE PLIBONIGI LA EFIKECON DE NIAJ VELŜIPOJ.
KIAL VI HAVAS ETAN DRAKŜIPON?
ĈI TIAJ ŜIPOJ HAVIS MALALTAN KAREN-PROFUNDON. KAJ ILI ESTIS TRE BELE ELPENSITAJ. DRAK-ŜIPOJ IOM RAVAS KAJ INSPIRAS MIN.
FRAŬLINO, ONI TELEFONAS AL VI!
MI IROS!
?
TIE ESTAS NENIO INTERESA, SINJORO CROSS. VENU, MI MONTROS AL VI LA VELFAREJON.
CROSS FARIĜAS PLI KAJ PLI TEDA! ESTUS BONE, SE IU MALBONAĴO OKAZUS AL LI.
31


LA VIZITO ESTIS EGE INTERESA, MED. MI REDANKAS VIAN INVITON.
LA PLEZURO ESTIS POR MI, SINJORO CROSS.
ŜI ESTAS PLI NERVOZA OL HIERAŬ. TIU ŜIPKONSTRUEJO MERITAS PLI PROFUNDAN TRASERĈADON... SEKRETE.
ANDY HAVAS BONAN GUSTON POR AŬTOJ.
ĜIS, SINJORINO STONE! NI NE ALVENOS POR LA VESPERMANĜO! NI HAVAS FARENDAĴOJN EN LA ALIA FLANKO DE LA LAGO!
JEN INVERFARIGAIG!
LA BOATO ŜAJNAS AL MI BONEGA. REMANTE, NI ALVENOS AL LA UNUA PUNKTO DE NIA ESPLORO ĈIRKAŬ NOKTOMEZO.
32.


SED, AL KIE NI EKZAKTE IRAS?
NI DIREKTIĜAS AL LA ŜIPKONSTRUEJO DE FRAŬLINO McGUIRE. NOKTE KAJ ŜTELEME, KIEL KRIMULOJ.


NIN ATAKIS LA... MONSTRO DE LAGO NESS, ĈU NE?
NI KAŜU NIN, ANDY! IU PROKSIMIĜAS!
ELIRU KUN LA MANOJ SUPER LA KAPO!
34


MI PENSIS, KE MI VIDIS OMBRON!
VENU ĈI TIEN, MAJSTRO. NI IRU EN ĈI TIUN KAVON!
LA IREJO PLILARĜIĜAS. DONU AL MI LA LANTERNON.
BZZZZZ
DENOVE ILI! ĈI-FOJE ILI IĜAS VERE ĜENAJ POR MI!
35


LA KAVERNO JA ESTAS EKIPITA!
ŜAJNE ESTAS IO... TIE!
36



ARMEO DA VIKINGOJ! ARMEO DA STATUOJ!
JEN TIUJ, KIUJ «ATAKIS» NIN. KION SIGNIFAS ĈIO ĈI?
MI TIMAS EKKOMPRENI... KIA TERURAĴO! RUZAĴO!
KIE MI VIDIS TION ANTAŬE?
JEN ALIA IREJO. ALIA KAVERNO.


SED... LA MONSTRO DE LAGO NESS! KIO DIABLE OKAZAS?
ĈI TIUJ APARATOJ PROBABLE ESTAS SENSILOJ KAJ BILDTRANSMISIILOJ, KAJ LA KONSTRUINTOJ DE ĈI TIUJ KAVERNOJ UZAS LA ILOJN POR TIMIGI LA VILAĜANOJN.
SED, KIAL ONI FARIS TION?
RESPONDI ESTAS MALFACILE, SED MI EKKOMPRENAS.
MAJSTRO, VENU RIGARDI!
DIO MIA, VERE MIRINDE!
38.



RUNOJ! ARKEOLOGIA TREZORO, JES! LORDO PORTLETT PRAVIS.
SE PAROLI PRI PORTLETT... JEN MATERIALOJ, KIU ŜAJNE APARTENAS AL LA EKSPEDICIO.
BRITIS
MUSEU
ĈU LA MAL-APEROJ ESTIS KRI-MAJ, DO?
JEN PLILONGIGO DE LA KAVERNOJ. KIU SCIAS, ĈU NIAJ ARKEOLOGOJ ESTAS KAPTITAJ?
39.


PLUPAŜU ANTAŬEN, KARA CROSS, KAJ VI ALIĜOS AL LA MALBENITA EKSPEDICIO POR ĈIAM!
JEN, MIAJ KARAJ AMIKOJ. CROSS KAJ WHITE NE ĜENOS NIN PLU! ILIA SORTO ESTAS SIGELITA.
TAK
BBBBBRRRRRRRR
ATENTU!
KLANK
40


STRANGE... LA MALAPERO DE MIA DELONGA MALAMIKO NE PLEZURIGAS MIN TIOM, KIOM MI ATENDIS. AL MI PLAĈUS VIDI LIN SUFERANTAN. VI SAMOPINIAS, ĈU NE, KARA MEDWENNA?
CERTE JES, MURDOCK.
MEDWENNA McGUIRE DIRIS LA VERON, KIAM ŜI ASERTIS, KE LA BORDO DE LA LAGO ESTIS PLENPLENA JE SUBTERAJ KAVERNOJ.
MI TIMAS, KE NI FALIS EN KAPTILON.
ĈIELO, ANDY! RIGARDU!
41


JUNA VIRO, MI NE SCIAS ĈU VI POVOS ELIRI EL ĈI TIE, SED ALMENAŬ NI MORTOS POST ADMIRI LA PLEJ GRANDAN RUN-ARON, KIUN ONI IAM ELTROVIS.
JEN LA REVO DE LORDO PORTLETT... SED ĈIO ĈI NE ESTOS UTILA AL NI.
SE PAROLI PRI UTILAĴOJ, JE LA DEKSTRA FLANKO ESTAS PIED-SPUROJ.
DIO MIA, ĈU EBLAS, KE LA ARKEOLOGOJ IRIS ĈI TIUN VOJON?
VERŜAJNE ESTAS IO TIE!
42


KIA TERURAÎO!
JEN TOM FIELDING. TIU, KIU MALAPERIS SAMTEMPE KIEL LORDO PORTLETT. LAŬ ĈI TIUJ NOTOJ, TIU LASTA DAŬRIGIS SIAN IRADON...
LORDO PORTLETT! DIO MIA, ONI SEKVU LIAJN PAŜOJN.
T. FIELDING 1936 LOCH NESS
AAAAAAAHH
43.


MAJSTRO, KIE NI TROVIĜAS? RESPONDU, MI PETAS!
NUR NE MOVIĜU, ANDY. MI HAVAS ALUMETOJN EN MIA AKVOIMUNA SAKETO.
SCRATCH
ANDY?
HAAAAAA!
LI ESTIS MALPLI BONŜANCA OL NI. NI ESTIS TRE PROKSIMAJ AL SIMILA SORTO!
LORDO PORTLETT, MI SUPOZAS!
ĈIO ĈI NE INDIKAS AL NI, KIE NI ESTAS... KAJ MI HAVAS NUR KELKAJN PLIAJN ALUMETOJN!
44.
OLEFFE - GRENSON
1994